

KOMENTOJ KAJ PRECIZIGOJ PRI IMPONA VERKO

Ĉar plej interesas min enciklopediaj verkoj – mi havis la okazon skribi pri tio en *LGI37* je paĝo 24 –, mi aĉetis la imponan prilaboraĵon de Andreas KÜNZLI, *Universalaj Lingvoj en Svislando*.

En epoko kiam multo estas nur supraĵa, mi tutunue volas saluti la benediktan laboron de tiu serioza kaj kompetenta, juna (li estas samaĝa kiel mia unuenaskita filino) esploranto de la historio de nia lingva komunumo. Retrorigardi al niaj radikoj ne signifas esti paseisto, sed scii de kie ni venas helpas por pli bone kompreni, kiu ni estas kaj kien ni iras.

Antaŭ ol komenci la legadon, paĝo post paĝo, unuspire mi foliumis la volumon pli ol 1100-paĝan. Impresis min la nombro da portretoj kaj diverstemaj fotoj, pli ol 1200, el kiuj multaj estis al mi nekonataj, kaj mi komencis tiel eniri en la filmon de nia kaj flanka historioj. Vi tamen bonvolu permesi al mi kelkajn prihistoriajn komentojn kaj precizigojn.

☞ paĝo 69: L. L. Zamenhof mortis la 14-an de aprilo (ne de marto) 1917.

☞ p. 156: kion signifas la volapuka titolo “cifal” tradukita per “ĉifalo”?

☞ p. 187, 937 kaj ceteraj: jen kiel René de SAUSURE skribis pri si al Th. CART (26-X1908):

“Mi naskiĝis en Ĝenevo la 17-an de marto 1868. Mi studadis en la Ĝeneva gimnazio; poste en Germanujo dum unu jaro; poste en Parizo dum kvar jaroj (du jaroj kiel ‘*élève interne de l’École Polytechnique*’, kies diplomon mi havas). Poste mi veturis Amerikon, kie mi laboris kiel fervoja kaj meĥanika inĝeniero; poste mi reeniris Universitaton kaj ricevis la diplomon de D-ro Fil. de la *Johns Hopkins University* en Baltimore. De post tiu epoko mi estis profesoro de Matematiko kaj de Fizika Matematiko ĉe la Katolika Universitato de Ameriko en Washington dum tri jaroj. Fine, mi revenis hejmen kaj estas de antaŭ kvar jaroj Privata-Docento ĉe la Ĝeneva Universitato.”

☞ p. 196: “Pli granda manifestacio honore al Privat kaj Ecabert okazis en novembro 1963 en la aŭditorio de la neŭŝatela universitato”, kaj tuj poste: “Dank’al iu speciala fonduso povis esti produktita Eo-ŝtampo uzata de la svisa poŝto”.

Mi ne scias pri kiuj fonduso kaj poŝta ŝtampo temas, sed mi scias, ke meĥanika poŝta ŝtampo estis efike diskoniga en 1962. Meĥanika poŝtstampilo konsistas el du ŝanĝeblaj partoj:

– ortangula teksto maldekstre, memoriga, reklama, ktp, kun ilustraĵo aŭ ne,

– ronda datstampilo kun indiko de sendurbo por nuligi la poŝtmarkon dekstre.

Nu, dum la tuta jaro 1962, po du urboj ĉiumonate, meĥanika poŝtstampo kun portreto de L. L. Zamenhof memorigis en la germana lingvo, ke Esperanto estis 75-jara (“*75 Jahre Internationale Sprache ESPERANTO*”). Ĉiu monatfino du tiaj tekstoj iris al du novaj urboj por esti tie uzataj kun propra ronda urba movebla dat-stampilo. Nekalkulebla estas kiom da miloj el tiaj mesaĝaj poŝtampaĵoj sur kovertoj kaj kartoj forflugis en- kaj ekster-lande. Jen la nomoj de la urboj kiuj uzis la koncernan poŝtan stampilon kaj la daŭro de la uzotempo:

jan. Basel + Luzern; feb. Biel/Bienne + Zürich; mar. Olten + Winterthur; apr.: Glarus + Aarau; maj. Grenchen + Schaffhausen; jun. Langenthal + Baden; jul. St Gallen + Liesthal; aŭg. Brugg + Chur; sep. Bern + Rapperswill; okt. Herisau + Thun; nov. Frauenfeld + Solothurn; dec. Zug + Burgdorf.



☞ p. 232: M. WITTENBERG, M. Movo pseŭdonime, naskiĝis en Witebsk (Rusio) la 15-an de junio 1881 kaj mortis en Zuriko la 14-an de julio 1954.

Je la morto de Robert KREUZ, urĝe sendita de BASTIEN, prezidanto de UEA, por lin reprezenti dum la funebra ceremonio en Ĝenevo la 4-an de februaro 1936, Wittenberg estis interduma direktoro de UEA kaj redaktoro de *Esperanto*. Ruso, ekzilita pro politikaj kialoj, Wittenberg havis francian pasporton kaj ricevis kelksemajnan permeson por rezidi en Ĝenevo por anstataŭi Kreuz-on. Kiel garantiantoj por li en Svisio estis d-ro Th. OETTLI el Celerina/Grisons kaj Hans JAKOB el Ĝenevo.

En ĉiu kajero de lia *Per unuigitaj fortoj – ĝenerala revuo de la E-movado* (1937-38) – estis okulfrapa pagita anonco de *Maschinenfabrik a. d. Sihl* en Zuriko pri “Centrifug-pumpiloj”.

Post la milito, sub la plumnomo M. Galmud, Wittenberg france verkis vortaron de la jida lingvo.

☞ p. 302: la laŭleĝa geedziĝo de Edmond Privat kaj Angèle FALLOT okazis antaŭ la help-

urbestro de Besançon (FR) la 25-an de oktobro 1911. Dato de la divorco: 19-an de oktobro 1925. Angèle restis aktiva esperantisto pro kuna vivo kun GRENKAMP-KORNFELD kaj mortis en Parizo la 29-an de novembro 1943.

☞ p.312: rilate al filatelo indas almenaŭ krome menci, ke la poŝta kontoro kiu funkciis dum la berna universala kongreso de 1913 response de SPIELMANN, havis permanan datstampilon kun teksto nur en esperanto: BERN. IX UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO – mia rimarko: ĉu oni devas paroli pri hobbio (filatelo) aŭ pri uzo de esperanto en la praktiko de poŝto?

Dum multaj jaroj tiu poŝta stampo estis konsiderata kiel la unua en la mondo ĝis kiam pruviĝis, ke tio okazis jam la antaŭan jaron en Krakovo.

☞ p.343: sur la foto montranta la kongresan oficejon en Ĝenevo (fotis MALLET, 1906) estas Paul BERTHELOT (maldekstre) kaj Gabriel CHAVET.

☞ p.344: la citita Jules Forestier partoprenis en la vaŝingtona universala kongreso kaj jen tio, kion li skribis al parenco sia (el la franca):

“Mi ĵus ricevis grandan sukceson ĉe la kongreso al kiu mi devis paroli kiel reprezentanto de Svisujo. Akceptante tiun honoron mi tamen zorge atentigis, ke mi estas franco” (dato de la poŝta stampo sur la karto: 17-8-1910).

☞ p.393: Lina EMILIE, denaske RUCH, vidvino de Hector HODLER, naskiĝis en Morges la 20-an de julio 1877 kaj mortis en Nice (FR) la 21-an de januaro 1964.

☞ p.468: Maria MILSOM apartenis al la reformita Eklezio, sed ŝi konvertiĝis al katolikismo en 1910 ĉefe sub la influo de pastro Austin RICHARDSON, prezidanto de IKUE. Vizitante ŝin dum kelkaj tagoj antaŭ la 9-a UK en Berno kaj la 4-a kongreso de IKUE en Romo, Richardson mortis en Bossey (FR), “apud Genève” diras la morto-anoncilo. Kongresanoj en Berno partoprenis en la enterigo kaj Zamenhof ĉeestis en la diservo memore al li en Berno.

Maria Milsom havis du filojn, Edwin (1880-1955) kaj Albert, jezuito, (1890-1957). Ambaŭ naskiĝis en Ĝenevo kaj partoprenis en la unuaj UK kaj kongresoj de IKUE.

Charlotte PULVERS tiel skribis pri si al la barcelonano Jako CLARAMUNT:

(Basel 22.II.1911) “Mi estas germanino, ne svisino; mi nur loĝas en Svislando.”

☞ p.544: foto *Privat kun esperantistoj* – meze de la unua vico, ĉe la tablo, estas Théophile Cart (‘Blankbarbulo’). Pli bela kaj klara estas la sama foto sur la glaciujtaj paĝoj meze de la libro.

Cetere, sur la samaj paĝoj kaj pri la foto post kunveno de pacifistoj ĉirkauantaj Zamenhof-on dum la ĝeneva UK de 1906, krom la cititaj svisoj F. SCHNEEBERGER kaj E. Privat, estas ankaŭ Théodore RENARD (dua vico, blanke vestita, inter Schneeberger kaj Zamenhof) kaj A. MONOD (tute dekstre de la tria vico).

Sur la foto de la festotago en Ĝenevo, la 16-17-ajn de majo 1908, malantaŭ la sidantaj virinoj, rekoneblas René de Saussure (altkreska ĉe la maldekstra piliero) kaj, je lia maldekstro, Hector Hodler.

☞ p.654: la ses multobligitaj kajeroj 1903 de *Svisa Espero* estis permane skribitaj de Th. Renard. Svisoj, li disponis pri du adresoj: plej ofte ĉe *6 Vieux Collège* en Ĝenevo kaj en Arlod (Ain, FR). En 1905 li gastigis Zamenhof-on kaj lian edzinon siahejme en Ĝenevo.

☞ p.701: rilate al la 31-a UK en Berno (1939) ‘rezervita al IEL’ jen tio, kion skribis Spielmann al Bastien la 28-an de aprilo 1938:

“Tre estimata S-ro Prezidanto, Koran dankon por via tre ŝatata letero de la 20a de aprilo kaj por la decido okazigi la U.K. 1939 en Bern. Kvankam flanke de UEA, (precipe de Liniger) oni diris, ke ni ne kapablos organizi la U.K. sen helpo de UEA, ni faros nian eblon kaj ni estas certaj, ke ni sukcesos. Ni havas sufiĉe da bonaj kunlaborantoj kaj absolute ne permesos enmiksiĝon de la alia flanko. UEA ja decidis mem okazigi 1939 U.K. en Svislando kaj ĉi tiun someron okazigas ferian semajnon en Brunnen (Svislando). Verŝajne vi legis aŭ aŭdis kion nun skribis UEA en “Esperanto”, ke en nia Jarkunveno de S.E.S. en Biel, 3.4.38: ‘La kunvenintaro akceptis unuanime proponon, ebli-gantan por la kunigo de ĉiuj fortoj, kaj postulantan ke la Kongreso en Bern estu organizata de ambaŭ internaciaj Asocioj: de IEL kaj de UEA samrange, kaj ke la membroj de UEA ĝuu la samajn rajtojn kiel tiuj de IEL. Ĉi tio estas denove granda mensogo, ĉar tia propono aŭ decido tute ne estas akceptita en Biel. Nur deziresprimo estis farata, ke baldaŭ paca kunlaborado estos ebla, sed ne estis akceptata propono aŭ decido pri komitata aŭ organiza kunlaborado de IEL kaj UEA por la U.K. de 1939. Tion ni estus rifuzintaj, certe ne estus akceptintaj, ĉar ni IEL-anoj havis la plimulton kaj SES tion ja ne estus povinta akcepti sen antaŭa interkonsento kun IEL. Vidu nur kiel ili laboras, sed ni ilin ne

timas. Ni diris en Biel, ke ĉiuj gesamideanoj povos partopreni la U.K., sed ne enmiksiĝi en la organizon, nek malpacigi ĝin. S-ro Goldsmith venos la 8an de majo Bernon. Ni ĉion bone ordigos kaj petas akcepti niajn korajn salutojn. E. Spielmann.”

Aliflanke dirite, la kongreso disvolviĝis “sen germanoj kaj ĉeĥoj”, sed en ĝi partoprenis Teo Jung. La nazian Germanion li forlasis jam de jaroj kaj rifuĝon li trovis en Nederlando, kie li daŭre aperigis *Heroldo de Esperanto*.

☞ p. 734: Charlotte (kaj fratino Olga) Pulvers lernis esperanton en Strasburgo (tiam sub germana regado) dum la lernojaro 1906-07. En 1914 (reeld. 1924) aperis ŝia traduko *Elzacaj legendoj*.

☞ p. 981: en *Kronologio, resumo kaj konkludoj* mankas la 46-paĝa *Svislando kun poŝtaŭtomobila servado sur la Alpo-stratoj* verkita de Ed. Spielmann, presita de Esperanto Triumfonta (aprilo 1920-decembro 1924) de Teo Jung kaj eldonita de Svisa Esperanto-propagando-Servo en Bern helpe de Svisa Centra Turisma Oficejo en Zürich kaj de Ĝenerala Poŝta Direkcio en Bern:

“Se via lingvo ne estas mezeŭropa aŭ angla, uzu nur Esperanton; ĝi nun forte disvastiĝas ankaŭ en la trafikaj kaj turismaj rondoj de Svislando” (p. 9).

☞ p. 1085-1095: *Indekso de nomoj*

BERTHELOT Marcel Paul (pseŭd. Marcelo Verema) – naskiĝis la 26-an de julio 1881 en Auxerre, FR.

CARLES Alphonse – naskiĝis en Gigean (proksime de Montpellier, FR) la 25-an de septembro 1867 kaj mortis en Albi, FR, la 17-an de aŭgusto 1929.

DOR Henri mortis la 28-an de oktobro 1912 en Caluire et Cuire, apud Lyon (FR).

RENARD Théodore – naskiĝis la 29-an de junio 1877. Esperantisto de 1900.

ZAMENHOF L. L. – bedaŭrinda tajperaro diras, ke li naskiĝis en 1895.

Ĉar li sciis resti nepartiano, objektiva kvankam nedubeble prefere esperantisto, ĉiukaze fore de detruigaj polemikoj, Andreas Künzli estas vera historiisto male al tiuj, kiuj skribas tra la prismo de sia pasio pretende pri historio. Kun gratuloj kaj dankoj al li pro lia ne malhavebla konsultlibro por esplorantoj de nia lingvo kaj interlingvistiko, ankaŭ neesperantistaj, mi ne rezistas al la tento rememori pri poemo, kiu ĉiam fascinis min:

“LA TRI TEMPOJ

La tempo estanta
rapide forkuras.

Karl JOST

La tempo estinta
eterne daŭradas.

Sviso

(1876-1952)

La tempo estonta
malfrue alvenas.”

Jean Amoureux